katolika sento

JARO 14a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO
BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo italliroj **2500**

KATOLIKA SENTO

10-11,

54a Jaro 1975 Oktobro-Novembro

†

SAC. FERDINANDO LONGONI
prezidanto de I.K.U.E. ekde la 4a de februaro 1971
ne plu estas inter ni!

Dio alvokis sian fidelan serviston maturigitan por la ĉiela premio pere de sia fidela sindediĉo al Dio, je la 24 de oktobro 1975.

Ni vidis lin lastfoje dum la unuaj tagoj de la 36a IKUE-Kongreso en Romo, kiam li, profitante de ioma paŭzo de sia malsano, dediĉis siajn lastajn fortojn por la katolika esperanta movado. Li venis kun sia programo celanta novan impulson al nia asocio, montrante la bildon de la farita laboro kaj proponante sugestojn kaj planojn por la estonta. Sed kiom aliiĝis lia fortika figuro kompare kun la nuna aspekto! Montriĝis evidente al ĉiuj, kiom li suferis lastatempe. Fakte, li ne kapablis rezisti, spite al sia konfido en la plibonigita sanstato, kaj post nur du tagoj li devis forlasi la kongreson. Lia malsano rapide progresis. La plej modernaj energiaj kuracadoj povis nur plilongigi lian vivon, sed ankaŭ liajn suferojn. Ni pensis, ke kiel Dio ne ŝparis sian Filon mem, kiam venis la horo de nia elaĉeto, tiel en sia amo, li volis ellabori, poluri, sanktigi sian serviston, per saĝaj batoj skulpti el li sian ĉefverkon. Kaj tiel en lia morto ni vidas ne malvenkon de la naturo, sed kulminon de la graco. Fakte li dum sia tuta 59-jara vivo estis dediĉita al Dio. Ekde sia pia infana aĝo kaj siaj studoj en la Milana seminario prepare al la sacerdoteco, kiun li atingis 23-jara, ĝis siaj animzorgaj taskoj (16 jaroj en Cerro - Lago Maggiore kaj 17 en Limbiate - Milano), li daŭre progresis laŭ la vokiĝo donita al li de Dio.

Sed ni memoras lin pro lia flanka sed ne malpligranda esperantista idealo, kiu fascinis lian animon, kiu

ŝajnis ne kapabla fermiĝi en loka, kvankam intensa, aktiveco. Tiu lia aspiro povis plene realiĝi precipe kiam, antaŭ 4 jaroj kaj duono li estis per amasa voĉdono, kvazaŭ aklame elektita prezidanto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kio tiel kronis lian decidan kaj luman agadon kontraŭ kelkaj devojiĝoj, kiuj minacis la tradician fidelecon de nia Asocio al la ekleziaj direktivoj. Sub lia gvidado energia, sed bedaŭrinde tro mallonga, IKUE retrovis sian ĝustan vojon kaj skribis la plej belajn paĝojn de sia historio.

Nun sacerdoto Ferdinando Longoni montras al ni la luman celon de sia tuta vivo: kaj, ĉar lia vokiĝo estas ankaŭ la nia, kiel li arde respondis al la dia inspiro, tiel ni ankaŭ donu ĉion al la katolika esperantista agado: ni iru antaŭen sub lia ekzemplo laŭ la vojo de Dio!

.....

LA CENTRA OFICEJO de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (C.O. de I.K.U.E.) estas jam realaĵo. Kiam p. Paruzel proponis dum la Kongreso, ke la IKUE-Sekretariejo estu stabile starigita en Romo, post la tiu cela transdono de apartamento al IKUE, fare de sac. Prof. Angelo Duranti per regula kontrakto, la kongresanoj aprobis entuziasme la decidon, kaj la Prezidanto esprimis sian ĝojon por tiu aranĝo, kiu aldonos internacian konsiston al nia tutmonda Asocio.

Oni komisiis, do, la romajn samideanojn zorgi pri la afero, tiel ke la sekretariejo povos baldaŭ funkciadi. La roma grupo kun respondeca sento akceptis la taskon kaj tuj komencis la preparojn. Tiel jam de la 4a de septembro oni povis oficiale anonci, ke la C.O. de IKUE estas malfermita. Fakte, ĝis oni havos la oficialan elekton de stabila sekretario en Romo, la servoj estos plenumataj fare de volontuloj, kiuj viciĝos en la oficejo dum la

feriaj tagoj laŭ ĉi tiu horaro:

Lunde kaj Jaŭde: " 17-19
Marde: " 10-12
Merkrede, Vendrede, Sabate: " 16-18

Oni povas jam de nun sin adresi por ĉio, kio rilatas IKUE-n, krom al S-ro Franco Galbusera en Verono,

ankaŭ al nia Roma Oficejo, laŭ la nova adreso:

C.O. de I.K.U.E.
Via Francesco Berni, 9
I-00185 ROMA tel: 75.88.388

Ekster la dirita horaro oni povas telefoni al: F. Giacinto Jacobitti - (06) 73.15.934; aŭ: 73.03.06.

(Bv. noti, ke ĉi tiu lasta telefona numero anstataŭas alian: 73.85.15 jam ne plu validan).

UNUIGO DE EKLEZIOJ

La kvina Asembleo de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj (EKE), kiu havos lokon en Nairobi (Kenjo) de la 23a de novembro ĝis la 10a de decembro, konsistigos tre gravan okazaĵon. En tiu ĝenerala Asembleo, kiu estas la plej alta aŭtoritato de la Konsilio, partoprenos la reprezentantoj de 271 Eklezioj membroj, kaj la romkatolika Eklezio sendos Observantojn. Ĝia pretigo daŭris longe, kaj en ĝi oni diskutos pri la temo: "Kristo savas kaj liberigas".

Ĉio pensigas, ke tie oni multe parolos pri la unueco, ne nur ĉar la unueco de la kristanoj, kiun oni devas restarigi, estas la celo de la ekumena movado, sed ankaŭ pro la fakto, ke la unuecon oni povas koncepti en diversaj manieroj, kaj por la bona funkciado de la Konsilio oni postulas la ekziston de akordo almenaŭ pri iu proksima celo. La bazo de ĉi tiu institucio, tio estas la kredo je la misteroj de la Triunuo, de la Enkarniĝo, de la Elaĉeto, povas esti nur deirpunkto. La demando estas tiamaniere metita en la decidoj de EKE: "Kia estas la unueco, kiun ni celas?".

En la Asembleo de Evanston, la ortodoksuloj, kontraŭstarante la konceptadon de la protestantoj, laŭ kiu la unueco jam ekzistas, kaj la sola problemo estas ĝin manifesti, insiste asertis, ke "la reunuiĝo de la kristanaro, pri kiu okupiĝas EKE, povas efektiviĝi nur surbaze de la tuta dogma kredo de la primitiva Eklezio nedividita, sen iu ajn depreno aŭ ŝanĝo", kaj ili aldonis, ke la ĉiamdaŭro de ĉi tiu kredo estis certigita per la episkopa intersekvado, ekde la Apostoloj. En la posta Asembleo, tiu en Novdelhio, estis proponita al la delegitoj difino pri unueco, ellaborita de la

estraroj, kaj, iomete modifita, ĝi estis sendita al la partoprenantaj Eklezioj. En ĝi estas indikitaj la elementoj, kiujn devas enteni la unueco, sed kelkaj estas ankoraŭ tre malprecizaj, kaj oni ne povas diri, ke ili estas ĉiuj. La starpunkto ortodoksa ne estas kontentigita, pro kio la metropolito Nikodim deklaris tiun difinon "plene protestanta" ('Ecumenical Review', 1969, p. 123). En 1972 la centra Komitato, kunveninta en Ĝenevo, prezentis proponon pri "unueco videbla en unu sola kredo kaj en unu sola eŭkaristia societo, esprimita en la kulto kaj en la komuna vivo de Kristo" ('Ecumenical Review', 1974, p. 166). Kaj en kunveno, okazinta en Salamanko zorge de la Komisiono Kredo kaj Konstitucio, la unuiĝinta Eklezio estis konceptita kvazaŭ koncilia frateco aŭ societo de lokaj Eklezioj inter si unuiĝintaj. Tamen ĉi tiuj esprimoj povas esti komprenataj diversmaniere, kaj aliflanke estas inkluzivitaj en ili elementoj antaŭsupozantaj realan kredunuecon, kia estas la interkomunio kaj la konsento de la valideco de la pastraj oficoj. Iu diskuto, farita en Nairobi pri la postuloj de unueco celata de la ekumena movado aŭ almenaŭ de EKE, prezentos tial vivan intereson. Pli aŭ malpli frue estos necese, se oni volas realigi la unuecon de la kredo, montri, ke oni konkordas pri ĉiuj veroj, kiujn la Eklezioj konsideras revelaciitaj de Dio. Tia feliĉa tago ankoraŭ ne ekaperis.

Intertempe, interne de la ekumena Konsilio disvolviĝas fenomeno pruvanta la forton persistan, kaj sendube jam nebremseblan, de la deziro de unueco. Mi intencas paroli pri unuiĝoj farataj inter apartaj Eklezioj, kies unuopaj nomoj restas disigitaj. Estu, ekzemple, la unuiĝo de kvar Eklezioj, unu el kiuj estu la anglikana, alia la metodista, tria la reformita, kvara la anabaptista. Ili akordiĝas por kune formi la Eklezion, kun la sama kredo, la sama kulto, la samaj pastroj en

artikita unueco. Sed tio ne solvas la ekumenan problemon, ĉar la komunumoj, al kiuj daŭre ili aliĝas, restas disigitaj. Tamen ĉi-kaze oni povas turniĝi al tiuj komunumoj, por ke ili demandu sin, ĉu ilia disigiteco estas necesa. Cetere, la unuiĝantaj Eklezioj donas la ekzemplon de grandanima respondo al la alvoko de unueco, ĉar ili ĉiuj devis ion oferi, minimume sian aŭtonomecon, kaj akcepti la ŝanĝojn postulitajn de la unuiĝo. Ili pagis la prezon de la unueco.

Nu, tiuj unuiĝoj de Eklezioj estas pli oftaj ol oni supozas. Fakte, mi legas en 'Ecumenical Review': "Dum la lastaj kvindek jaroj efektiviĝis 60 unuiĝoj; lastatempe formiĝis unuiĝintaj Eklezioj en norda Hindujo, en Pakistano, en Britujo. En 30 landoj komenciĝis intertraktoj, kaj estis prezentitaj al la Eklezioj projektoj por ilia decido." (1974, p. 291). En la sama revuo, ekde 1954, aperas ĉiun trian jaron raporto pri la movado de ĉi tiuj unuiĝoj de Eklezioj. La lasta, en aprilo 1974, montras la kreskon de tiuj unuiĝoj en pli ol 20 Landoj. La italaj Eklezioj valdana kaj metodista decidis unuiĝi post kvar jaroj.

Fine, jen nova fakto. Ĉi tiuj Eklezioj, jam unuiĝintaj aŭ unuiĝontaj, kunvenis en kongreso. Reprezentantoj de 26 unuiĝintaj Eklezioj, kaj unuiĝkomitatoj de proksimume 25 Landoj kunvenis en Toronto de la 2a ĝis la 9a de junio nunjara, sub la aŭspicioj de la Komisiono pri Kredo kaj Konstitucio. Ili redaktis mesaĝon, en kiu estas dirite: "Kiel unuiĝintaj Eklezioj kaj unuiĝkomitatoj ni insistas pri la alvoko al la artikita unuiĝo". Ili sentis la bezonon de unueco, por ke la Eklezio povu plenumi sian mision en la mondo. "Nun - ili diras - tia unueco mankas tie, kie la Eklezio estas dividita, kaj ĝi povas esti klare montrata nur pere de la videbla unueco de la kristanoj en unu kredo kaj en unu

komunio ĉe la bankedo de la Sinjoro". Jen, do, ilia idealo: "Ni havas la malproksiman vidadon pri unu Eklezio de la tuta popolo de Dio, konsistanta el apartaj Eklezioj. Ĉiu aparta Eklezio, laŭ sia propra nivelo (vilaĝo, urbeto, urbo, distrikto, regiono, nacio, kontinento) esprimas la komunecon de kristanoj en unu kredo, unu bapto, unu eŭkaristio; ili zorgas kaj respondecas unuj pri la aliaj, kuniĝintaj en unu atesto kaj en unu servo komunaj". Tamen, intertempe, la delegitoj devis konstati, ke, kvankam ili estas kuniĝintaj en sia grandanima deziro de unueco kaj en la sperto de siaj unuiĝoj, tiuj unuiĝoj estas malsamaj inter si. Malgraŭ tio, ili kuraĝigas sin reciproke en la strebado de avangardo en la lukto de ia unueco. Ili kalkulas je la ekumena Konsilio: "Ni deziras - diras la delegitoj - pli grandan sindevigon fare de EKE por serĉado de unueco videbla, kaj ni petas je nomo de niaj Eklezioj, ke EKE estu preta helpi kaj faciligi pli multe la disvolviĝon de la intertraktadoj por unuiĝo kaj la evoluon de rilatoj inter la unuiĝintaj Eklezioj" ("La Mesaĝo de Toronto", en SOEPI, 24/7/1975).

Dum intervjuo konsentita al la ĵurnalo 'Le Monde', la Pastoro Philip Potter, Ĝenerala Sekretario de la ekumena Konsilio, ricevis la jenan demandon: "Se, ekzemple, la anglikana Eklezio unuiĝus morgaŭ kun la katolika Eklezio, ĉu EKE estus plifortigita?". Li respondis: "La ekzemplo de la anglikana Eklezio estas hipoteza. Sed, se tia unuiĝo iam efektiviĝus, estas certe, ke la ekumena movado estus plifortigita" ('Le Monde' de la 20/9/1975, p. 9). Ĉi tiu respondo estas la saĝo mem, ĉar la unueco estas la celo de la ekumena movado, kaj same de EKE. Ĝi memorigas al mi demandon faritan de la rusa ortodoksa teologo George

(v. je p. 233)

"MADONO DE LA LARMOJ" en Sirakuzo
(mallonga historio: 1953-1975)

La dudeknaŭan de Aŭgusto 1953a, je la oka kaj duono, en Sirakuzo, urbeto kun 100.000 loĝantoj de la insulo Sicilio (Italio), en modesta domo de la strato "Degli Orti", el okuloj de la Madono, kolore kaj reliefe reproduktita en gipsa ikono (cm 29x22) sur nigra plato elfluis larmoj, kiuj falis sur la liton de sinjorino Antonina Giusto (n. en Sirakuzo, la 11an de Januaro 1933a, edziniĝinta la 21an de Marto 1953 kun Angelo

Jannuso).
Tiu ĉi ikono estis la geedziĝ-donaco de la frato de la edzo.
Dum la nokto, je la tria horo, de la dudeknaŭa de Aŭgusto 1953a, Antonina Giusto, jam de longe suferanta pro gravedeco (graved-toksado), subite sentis sin malsana, kaj kelktempe blindiĝis (antaŭe plurfoje ŝi suferis pro sama malsano).
La edzo, malriĉa horpage terkulturisto, malgraŭ la malsano de sia edzino, devis ŝin frumatene forlasi por serĉi laboron en tiu tago; sed, antaŭ ol eliri, li petis la bofratinon Grazia flegadi lian malsanan edzinon.
Al Antonina Giusto revenis vida senso. Tiam ŝi fiksis sian rigardon al ikono de la Madono kaj vidis la unuajn larmojn defluantajn el okuloj de la Madono.-
Ankaŭ la bofratino Grazia kun la onklino Sgarlata Antonina, kiu tuj alvenis, konstatis ke la Madono estas ploranta.
Matene, dum la unua tago ses- aŭ sep-foje la fenomeno ripetiĝis, poste ankaŭ je la deksepa kaj duono, kiam Angelo Jannuso, post la taga laboro, hejmen revenis.
Intertempe multaj personoj eniris en tiun domon por observi la "Madonon de la larmoj"; pro tio estis grandaj malordo kaj konfuzo. Tiam, laŭ peto de la polica Komisaro, por malproksimigi la popol-amason, la ikono estis eksponita ekster la domo, ĉe la angul-flanko de la strato, kaj poste (je la dudekunua horo)estis portita en urban policejon.
Dum la transportado la plorado de la Madono daŭriĝis la alveno en la urban polican oficejon. Sed sinjoro A.Jannuso denove volis la ikonon, kiun li deponis en la domon de siaj fratoj; poste li mem ĝin reportis en sian hejmon (je la dua de la 30a de Aŭgusto 1953).

Dum la tagoj 30, 31 de Aŭgusto kaj 1 de Septembro 1953a, antaŭ granda popolamaso la Madono plurfoje ploradis, kaj la fenomeno estis ankaŭ fotografita. - Ĉiumatene, ekde la sepa kaj duono ĝis la dudekunua kaj duono la ikono estis eksponita, por esti pli facile videbla por ĉiuj, sur ekstera muro de la domo de sinjoro Luca (tiu ĉi domo estas fronte al tiu de s-ro A.Jannuso) kaj poste, dum la nokto, estis reportita en domon de s-ro A.Jannuso.
Ekde la deknaŭa de Septembro 1953a ĝis la dudekooka de Aŭgusto 1968 la ŝankta ikono restis eksponita en placo "Euripide"; sed fine, la dudek naŭan de Aŭgusto 1968a ĝi estis solene transloĝigita en la novan grandan "Sanktejo"-n, kiu ĝis nun ne estas komplete finkonstruita.
La Madono lastfoje ploris je la dek unua kaj kvardek minutoj de la unua de Septembro 1953a,kiam la scienca Komisiono, kiu konsistis el doktoroj:M.Coppola, L.Cotzia, L. La Rosa, M.Marmotta, depreenis preskaŭ unu kuban centimetron (= tridek larmaj gutoj) kaj povis konfirmi, per kemia analizo, la miraklon: estis veraj homaj larmoj!.
Ankaŭ la Roma Eklezio, per la vortoj de Papo Pio XII, la 17an de Oktobro 1954a, agnoskis vera tiun supernaturan fakton.

LA MIRAKLOJ

Dum kaj post la plorado multnombraj estis la miraklo j. La unua persono inter ĉiuj, kiuj ricevis miraklon, estis Antonina Giusto mem, kiu saniĝis de grave d-toksado. Dum la larma elfluado de la Madono s-ro Nunzio Vinci, 49 jara, lignaĵisto el urbo Sortino (SR), paralizita en maldekstraj brako kaj kru -

ro, piege preĝadis al la Madono en la domo de A. Jannuso, subite saniĝis kaj povis movi siajn maldekstrajn brakon kaj kruron. Ankaŭ Marianna Gaudioso Vassallo, el urbo Francofonte (SR), saniĝis de malsano ne resanigebla, kaj poste s-ro Giuseppe De Simone paralizita en la dekstra brako ekde la jaro 1944a, de kiam li estis dujara, saniĝis antaŭ la ikono de la Madono; ankaŭ la trijara knabineto, dekstraflanke paralizita, Enza Moncada, el Sirakuzo, saniĝis.
Ekde la 29a de Septembro ĝis la 1a de Decembro 1953a pli ol 600 estis la eksterordinaraj resaniĝoj. -Unu Medicina Kontrol-Komisiono estis starigita la 7an de Oktobro 1953a por ekzameni la resaniĝajn kazojn.
Multnombraj estas la fideluloj, kiuj ĉiutage alvenas al Sirakuzo el ĉiuj proksimaj kaj malproksimaj lokoj de la tuta mondo. Dum la unuaj kvar monatoj tiuj, kiuj alvenis en Sirakuzo estis 1.800.000.
Ĝis nun la resaniĝoj estas pluraj miloj kaj ĉiam la Madono helpis per spiritaj kaj materialaj gracoj.

La Sanktejo de la "Madono de la larmoj" en Sirakuzo

La konstruado de la granda Madona Sanktejo, laŭ la projekto de la francaj inĝenieroj Michel Andrault kaj Pierre Parat, komenciĝis la 29an de Marto 1966a, sed nuntempe estas nekompleta.
Du jarojn post la konstrua komenco, la 28an de Aŭgusto 1968a, la kripto de la Sanktejo estis inaŭgurita, kaj la ikono de la Madono estis solene translokita de placo "Euripide" en la Kripton de la Sanktejo (29.8.1969).
La Madona Sanktejo, kies ekstera diametro estas longa 80 metrojn kaj la interna 38 metrojn, havas 18 enirejojn.

Post kiam ĝi estis finkonstruita, ĝi estos alta 80 metrojn, kaj havos areon de 40.000 kvadrataj metroj.
Nun en ĝi, kiu povas enhavi pli ol 3000 personojn, estas la ikono de la Madono de la larmoj kaj la relikvujo kun fiolo, kiu entenas iujn el la larmoj ekzamenitaj de la Kuracista Komisiono en la tago 1a de Septembro 1953a.
La 29an tagon de ĉiu monato okazas procesio sekvanta la sanktan relikvon.
La Sanktejo estos finkonstruita per monoferoj, kiujn daŭre la fideluloj el ĉiuj lokoj en la mondo sendos ĉu pro miraklaj resaniĝoj, ĉu pro ricevitaj gracoj, ĉu pro nura pieco kaj sindono al "Madono de la larmoj".
Oni sendadas monoferojn per ĝia poŝtĉekkonto:
N° 16-2118 "Comitato pro Santuario Madonna delle lagrime", via del Santuario N° 33, 96100 Siracusa - Italia -

La Sanktejo estas malfermita ekde la 7a ĝis la 20a horo en la nefestaj tagoj, sed ĝis la 21a horo en la festaj tagoj.
Apud la Sanktejo staras "La Casa del Pellegrino" (="Domo por pilgrimantoj"), kiu enhavas 40 litojn. La rezervigo de la litoj estas deviga ĉe "Segreteria del Santuario, via del Santuario, n° 33, 96100 Siracusa--Italia-".- La "Comitato" eldonas bultenon: "Madonna delle lagrime" (=Madono de la larmoj) en jenaj lingvoj: itala, germana, angla, franca, hispana, nederlanda.
La Bulteno informas pri la resaniĝoj kaj la gracoj ricevitaj de la fideluloj per propeto de la Madono. Ĉiu, kiu sendas monoferon, ricevas la Bultenon.
Pli kompletaj informoj estas raportataj en la libro: "Ha pianto la Madonna a Siracusa" (="La Madono ploradis en Sirakuzo") de Mons. Musumeci, eldonita en

la jaro 1954 kaj en la pli aktuala libro: "Il pianto di Maria a Siracusa" (="La plorado de Maria en Sirakuzo"), p. 88, eldonita en la jaro 1971, skribita de Monsinjoro Salvatore Giardina, Rektoro de la Madona Sanktejo; kaj jam tradukita en pluraj lingvoj.
Estas ankaŭ filmetoj (blank-nigraj, kun 49 bildoj), £. 1200; kaj filmetoj (koloraj, kun 50 bildoj), £. 2000
Ĉiu povos aĉeti tiujn ĉi librojn kaj filmetojn ĉe la "Comitato".

En la jaro 1973, 20a datreveno de la larmado, estis eldonita la speciala Bulteno "Madonna delle lagrime" (="Madono de la larmoj"), paĝoj 36, kun belegaj bildoj, en ses lingvoj, 160.000 ekzempleroj, kiu enhavas la tutan mallongan historion pri la madona larmado kaj pri la Sanktejo.

LA SIGNIFO DE LA LARMOJ.

Kion signifas la larmoj de la Madono?

Jen iuj juĝoj:

1e) LUIGI STURZO, senatano: "Eble la Madono ploras pro tio: kĉ la homaro sin konfidas al detruaj potencoj anstataŭ al konstruaj, al la malamo anstataŭ al amo, al la ĵaluzo anstataŭ al la interkonsento; al rasa, kasta, klasa malhumileco pli ol al frateco kaj internacia kunlaborado".

2e) COSTANTINO CAMINADA, monsinjoro: "Madono en Sirakuzo ne parolis. Nur ploris. Sendube Ŝi ploras pro la pekoj de la tuta homaro: ploras pro niaj pekoj".

3e) PIO XII, papo: (el radio-mesaĝo, 27.10.' 54) "Ĉu la homaro komprenos la misteran lingvaĵon de tiuj larmoj?"...-

Prof. ZAPPULLA Giuseppe - Catania

o o o

LA VIRINO LAŬ LA KATOLIKISMO

(Okaze de la celebradoj por "1975 - Jaro de la Virino" proklamita de UNO, la Itala Federacio Virinoj Artoj-Profesioj-Aferoj (FIDAPA) invitis Mons. Alberto Blondi, Episk. de Livorno, prelegi antaŭ elita aŭskultantaro en "Albergo Palazzo" de Livorno. Lian paroladon, kiun resumis Lidia NERI-LAMI, ni kun plezuro diskonigas).

"Kvalifiko de "persono" ne povas esti tutsimple atribuata: la latina signifo estas "masko"; laŭ alia interpreto estas "eltrovo de profundeco". Por rekoni al virino la kvalifikon de "persono" estas necese kompreni kia estaĵo estas tia, kiam ĝi estas nenies instrumento, nenies perilo, sed havanta la dignon de iu celo. La historio kaj la nuntempa mondo ŝajnas ne rekoni al ŝi tiun ĉi dignon; fakte la persoj preĝis dirante: - Mi dankas vin, Dio, ĉar vi ne naskis min malliberulo, besto, virino - kaj - daŭrigis Lia Moŝto - estis manko da proporcio inter virino okupata en inda profesio kaj virino uzata en la propaganda servo. En la Biblio, kontraŭe, estas plena rekono de la persona digno de la virino: ŝi metis finon al soleco de la viro, kiu estas konsiderata kompleta en la rilato viro-virino. Ankaŭ dum sia misio, Jesuo renkontas patrinojn, kiuj akompanas Lin kaj kiuj havas la kuraĝon resti apud la kruco, virinojn de la amikeco, virinojn, kiuj atestas Lian reviviĝon, kiam la virino estis nekredebla atestanto; fine, la Evangelioj parolas al ni pri la virino kiel dommastrino. Plie por esti "persono" ne estas sufiĉe - diris la Episkopo, ne esti ilo de aliaj, sed estas necese esti konscia pri propraj kaj precizaj celoj atingendaj. La virino estas urĝa por la nuntempa mondo: fakte, la strukturoj, la konkeroj, la institucioj de la nuna tempo suferas je soleco, kiel la unua viro".

Florovski en ekumena konferenco. Li deziris, ke oni favoru antaŭe la unuiĝon inter la Eklezioj plej proksimaj. Sekvante ĉi tiun kriterion, oni devus antaŭ ĉio starigi la unuiĝon inter la Eklezio ortodoksa kaj la Eklezio katolika, tiel proksimaj inter si. Koncerne la Eklezioj kaj komunumojn protestantajn, multaj el ili povos unuiĝi sen granda malfacileco, se ili sentas grandan deziron de unueco; sed ilia distanco rilate al la Eklezioj, kiuj en la Asembleo de Amsterdamo estis nomitaj je katolika tipo, ne multe ŝanĝiĝis. Tiel en la mesaĝo de Toronto kun ĝojo mi trovis esprimita deziron de novaj rilatoj "kun la Eklezioj ortodoksaj kaj romkatolika".

Kiel memorigas Pastoro Philip Potter en la sama intervjuo al 'Le Monde', la unueco ne povas efektiviĝi malmultekoste. Oni devas akcepti ĝian prezon, kaj, pro tio, konservi la postulojn de la vereco, sed oferi al la karitato ĉion ceteran.

tr.C.M.-P.M. Karlo Boyer, S.I.

LA VATIKANA RADIO por la Sankta Jaro. La aktiveco de la Vatikana Radio por la Sankta Jaro komenciĝis per la oficiala anonco de la Jubileo, la 9an de marto 1973; kaj krom la ampleksa laboro disvolviĝinta dum 1974 kaj 1975 estas antaŭviditaj kelkaj dissendoj dum 1976 por doni kvazaŭ resumon de la escepta religia evento.

La diversaj elsendoj efektivigitaj akcentis ĉefe la celojn indikitajn de la S.Patro por la Sankta Jaro, pri renoviĝo kaj repaciĝo kun la senpera raporto de liaj dokumentoj kaj paroladoj.

La Vatikana Radio resumis ankaŭ impresojn kaj dek-

larojn venintajn de la tuta mondo kaj kolektitajn rekte aŭ pere de redaktoroj, intervjuojn al ekleziaj eminentuloj el ĉiuj kontinentoj, al pluraj kleruloj kaj al tre multaj "ajnuloj".
Imponaj estis la aranĝoj prilaboritaj fare de la Vatikana Radio, per serio da elsendoj pri la "Historio de la Sanktaj Jaroj", la "Papoj kaj la Sanktaj Jaroj",kaj aliaj plej interesaj temoj, laŭ tre nombraj atestoj.La programoj estis efektivigitaj ne nur en la itala, franca,angla, germana kaj hispana, sed ankaŭ resumitaj en ĉiu el la 32 lingvoj per kiuj estas dissenditaj la programoj de la Vatikana Radio, tiel ke oni povas prave aserti, ke ili atingis la tutan mondon. Oni dissendis ankaŭ rekte kaj ilustris ne nur la grandajn papajn diservojn,la aŭdiencojn kaj la tagmezajn dimanĉajn paroladojn de la Papo el Romo kaj el Kastelgandolfo; sed tute aparte zorgoj kaj atentoj estis donitaj al la preĝrenkontiĝoj,spirittemaj kunvenoj kaj al ĉiuj aliaj oficialaj kaj periodaj manifestadoj, enkondukitaj de la Centra Komitato por la Sankta Jaro; inter kiuj menciindaj estas la dimanĉaj kaj festaj mesoj de la pilgrimanto celebritaj de kardinaloj, kun ampleksa raporto de iliaj homilioj; la aŭdiencoj al la grandaj pilgrimantaroj eksterlandaj kaj internaciaj, kiuj plurfoje superis la nombron de 20.000 ĝis 30.000 personoj; al la naciaj pilgrimantaroj kaj aparte al tiuj de la Tria Mondo, de soldatoj, ciganoj,junuloj, studentoj kaj ne katolikoj.Oni raportis detale pri 72 plej gravaj kongresoj, Konferencoj kaj Asembleoj, je arta kaj kultura karaktero: elmontroj, koncertoj, eldono de poŝtmarkoj kaj moneroj: por 34 el ĉi tiuj okazintaĵoj oni pretigis specialajn servojn.
Por helpi la pilgrimantojn pri la roma loĝado aŭ pri la jubileaj praktikoj estis aranĝitaj multaj elsendoj pri vizitoj al la Urbo. La teknikistoj zorgis pri laŭtparolservoj en la Bazilikoj, en la asembleajsalonoj, en pla-

co S.Petro por la Vespera Rozario kaj la Krucvojo Tiel same por grandaj pilgrimantaroj oni zorgis pri rektaj elsendoj kaj kunligoj kun la devenaj landoj, por ebligi al ĉiuj aŭskultantoj spiritan kuniĝon kun siaj samlandanoj. Oni invitis en la studiojn de la Vatikana Radio ĥorojn kaj muzikensemblojn, venintajn el ĉiuj kontinentoj. La efektivigitaj sonbendigoj estos utiligitaj post nelonge en serio da koncertoj dediĉitaj al "La pilgrimantaj ĥoroj".

BEATIGPROKLAMOJ KAJ KANONIZADOJ. Je la 12 de oktobro en Placo S.Petro estis celebrita la solena kanonizado de la beata Oliviero Plunkett (1625-1681), kiu estis proklamita Beata la 23an de majo 1920, fare de papo Benedikto 15a.
Je la 19 de oktobro, dimanĉe estis proklamitaj beatoj: Arnoldo Janssen (1837-1909), Jozefo Freinademetz (1852-1908), Eŭgeno de Mazenod (1782-1861) kaj Maria Tereza Ledochowska (1863-1922).
Je la 26 de oktobro estis proklamita sankta la Beata Justeno de Jacobis (1800-1860).
Je la unua de novembro, soleno de Ĉiuj Sanktuloj, estis proklamitaj Beataj: Ezekielo Moreno y Diaz, episkopo (1848-1906), Gasparo Bertoni (1777-1853), Vincento Grossi (1845-1917), Anna Michelotti (1843-1888) kaj Maria Droste zu Vischering (1863-1899). Fine, je la 16a de la sama monato estis beatigita en S.Petro la kuracisto profesoro Giuseppe Moscati.

K.E.J. (Kristana Esperantista Jarlibro).
La eldono de ĉi tiu ekumena Jarlibro estis vere kuraĝa entrepreno, se oni konsideras ĝian novan grandan formaton, la amplekson de ĝiaj informoj, la nunajn al

tajn kostojn de papero kaj presado, kaj la cirkonstancojn, en kiuj ĝi estis efektivigita, precipe la malbonan farton de ĝia ĉefa kompilinto. Ĉio ĉi tio donas pli grandan valoron al la donaco farita al la IKUE-kongreso kaj meritas nian dankon. En la unua paĝo estas la trafa skizo de sac. Longoni, kiun ni volis prezenti ankaŭ en ĉi tiu bulteno, ĉar, kvankam tiu portreto estis farita antaŭ du jaroj, ĝi montras la suferantan mienon de la Aŭtoro de la libro. Sekvas prezentado de la Jarlibro fare de la IKUE-prezidanto por la katolika Asocio, dum la KELI-a parto komenciĝas je p. 116, kun antaŭparolo de la respektiva prezidanto, past. A. Burkhardt. Ambaŭ partoj estas riĉaj je informoj, kvankam sen indekso, kiu helpus ilian serĉadon. Ilia dispozicio estas kelkfoje mallogika. Kaj eraroj, bedaŭrinde, svarmas, ofte pro la ne ekzakta transkribo de nomoj, sed ankaŭ pro informoj jam ne plu validaj. En la listo de la membraro oni lasis kelkajn paĝojn blankaj por notoj kaj korektoj.

Kvankam la venonta eldono devos rezulti el plena revizio de la nuna, ĉi tiu estos fundamenta.

La dua parto rilatanta al KELI estas granda espero de frata ekumena kunlaboro. Sed ni devas lasi ĝian recenzon al pli kompetenta persono.

KATOLIKA PREĜARO

Estis granda bedaŭro por sac. Longoni, ke ĉi tiu libreto, la dua verko de li pretigita por la Kongreso, presita apud Torino, pro la granda malfruo de la fervojaj servoj, ne alvenis ĝustatempe al Romo. Fakte la libreto devus esti, laŭ la intenco de la aŭtoro, kun invito al preĝo, efika helpo al tiu pli fervora vivo, kiu devus esti frukto de la Jubileo en la esperantista katolika medio. La fakto, ke lia voĉo alvenis al ni nur post lia morto, igas pli kara la verketon al ĉiuj, kiuj konis la

pian IKUE-prezidanton.
Post la unuaj paĝoj dediĉitaj al la Sankta Jaro, la libreto prezentas la plej kutimajn preĝojn, laŭ la teksto fiksita en la IKUE-Kongreso de Munkeno, j. 1960, kaj, krome, preĝojn por ĉiuj tagoj, por vizito al la tre Sankta Sakramento kaj aparte la sanktan Meson, Krucvojon kaj Rozarion. Troviĝas tie preĝoj por la konfeso kaj komunio kaj por diversaj celoj. Kaj ankaŭ mallongaj meditoj el la "Imitado de Kristo", el la "Preĝareto" de p. Carolfi, ktp. Ĝi instruas preĝi kun pli larĝaj ekleziaj kaj sociaj sentoj, laŭ la inspiro de la Koncilio. Kaj ĝia karakteriza trajto estas prezento de pluraj psalmoj laŭ la Zamenhofa traduko, kvazaŭ invito al la legado de la S. Skribo, unua inspiro kaj fonto de nia religia sento. La libreto riparas la gravan mankon, kiun oni sentis en la esperanta literaturo, post la elĉerpiĝo de ĉiuj antaŭaj similaj preĝlibroj.
Oni povas mendi la Preĝaron al nia Centra Oficejo de Romo, kontraŭ 1.000 it. liroj, plus afranko.

INAŬGURO DE ESPERANTA KINEJO EN RIMINI.

Je la 18a de aŭgusto kunvenis ĉe la parokejo de la Sanktaj Johano kaj Paŭlo en la kvartalo "San Giuliano Mare" (Sankta Juliano ĉe maro) en Rimini, preskaŭ 30 esterlandaj samideanoj el Pollando, Hungarujo, Svedujo, krom multaj esperantistoj el la najbaraj Cesena kaj Rimini.
14 el la kunvenintoj estis pastroj. Oni kune kuncelebris la S. Meson esperantlingve. Ĉefcelebranto estis Mons. Ladislao Miziołek, helpepiskopo de kard. Stefano Wiszynski en Varsovio. La ĉeestantaro, plejparte turistoj, partoprenis atente kaj kun admiro la diservon kun homilio de la pola pastro Prof. Henriko Paruzel, resumtra

ESPERANTO

dukita de pastro Albino Ciccanti. Tiu ĉi ludis ankaŭ orgenon dum la diservo kantante kun malgranda, sed fervora paroka ĥoro, liturgiajn kantojn en Esperanto.

Post la vespera Sankta Meso okazis la inaŭguro de la nova kinejo "ESPERO", baldaŭ preta por la somera uzado, starigita ĉe la preĝejo, anstataŭ la malnova, tro malgranda salono.

Tranĉis la blankverdan rubandon la pola Episkopo, kaj tuj fluego da homoj tre rapide plenigis la grandan salonon. Ne sufiĉis la 500 seĝoj preparitaj. Multaj personoj reiris hejmen kaj aliaj preferis stari dum la tuta tempo, tio estas tri horoj.

La parokestro sac. Duilio Magnani ĝojege salutis Esperante la ĉeestantojn, tradukante poste li mem por la neesperantistoj. "... Ŝajnas al mi - li diris interalie- ke ĉi tiu estas la unua Esperanta parokejo en Italujo. Ni intencas esperantiĝi kaj esperantigi. Ĉi tiu inaŭguro estas nur semo, kiun ni kune, el diversaj landoj, ĵetas, esperante ĝian multobliĝon". Ĝojega aplaŭdo subtenis la bondeziron.

Lia Moŝto la Episkopo Miziołek siaflanke salutis, varme kaj elkore dankis ankaŭ nome de ĉiuj gastoj, kaj benis la novan verdan flagon de la parokeja grupo UECI. (Temas pri la sama flago, kiu dum la 46a Itala Kongreso en Trieste, gajnigis premion al la aŭtomobilo: "la plej esperantista").

Du ĉarmaj fraŭlinoj, folklore vestitaj, donacis al la Episkopo bukedon da floroj kaj malgrandan verdan standardon, dum la ĉeestantaro svingis esperantajn flagetojn. Tre longe oni denove aplaŭdis la Episkopon kaj la eksterlandajn gesamideanojn, dum la Sekretario de la pola KUE, S-ro W. Tomaszewski, donacis al la pa-

rokestro, portreton de L.L.Zamenhof kaj memoraĵon de Varsovio.
Post tio la rimina ensemblo "Comunione e Liberazione" (Komuneco kaj Liberiĝo) ĝojigis ĉiujn per italaj seriozaj folkloraj kantoj, prezentitaj de Pastro Ciccanti mem.

Pastro Duilio Magnani

Abonkotizo al Katolika Sento por la tuta jaro 1976 estos ankoraŭ f. 1.500.

Por disvendi la restintajn ekzemplerojn de la romano "La Sklavoj de Dio" tradukita el la hungara de D.ro J.B.Hamvai, kaj presita de la Hungara Esperanto-Asocio kunlabore kun nia IKUE, ni oferos la volumon ĝis la elĉerpiĝo de la stoko, je it. Liroj 1.500 anstataŭ 2.700!

MENDU TUJ la ravan 400-paĝan romanon, kiu en Hungarujo kaj ĉie havis "furoran sukceson."!